# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**http://www.iespana.es/esperanto/k58.htm** **http://storm.prohosting.com/jesuo/k58.htm**

**Aprilo al junio de 2003, numero 58-a** **15-a jaro**


## Averto registaro

**Ĉar** ĉiu milito estas fia, **ĉar** ĉi tiu milito estas politike nekorekta, **ĉar** mi jam havis tro da mensogoj, **ĉar** ni estas je la limo de barbareco danke al kaprico de tiuj, kiuj vivas danke al la malsato de la Tria Mondo, **ĉar** mi jam naŭzas pri tio, ke oni primokas min, **ĉar** mi sentegas doloron najbaran, **ĉar** mi ne toleras, ke oni manipalaciu min, **ĉar** neniu politikisto reprezentas min kiam temas pri murdi je mia nomo, **ĉar** mi ne volas, ke miaj impoŝtoj makuliĝu per sango, **ĉar** pli bonan mondon oni ne povas konstrui per bomboj, sed per helpo neredonebla, per edukado kaj manĝaĵoj, **ĉar** mi jam naŭzis pri nekomprenemo, netoleremo kaj necivilizemo de tiuj memdiritaj civilizitoj kaj kies malsato pri povo ne havas limon, kaj ili havas povon, kiu amas nur sin mem, kaj viktimigas eĉ tiujn, kiuj havas ĝin, **ĉar** ili malaltiĝis tiom multe je sia malhomeco, **ĉar** Irakon armiligegis Okcidento, kaj nun ĝi volas likvidi ĝin kvazaŭ ĝi estu naztukon paperan uzitan, **ĉar** homa esto rajtas dignecon kaj respekton, esti aŭskultata kaj sentiĝi kunmastro de ĉi tiu mondo, **ĉar** mi volas, ke la heredaĵo, kiun ni lasu al niaj gefiloj, estu vivebla loko, **ĉar** demokratio de tiuj malbone diritaj demokrataj landoj devas havi opcion iam, **ĉar** niaj gvidantoj estas nenio sen ni, **ĉar** ĉio tio, kaj aliaj kaŭzoj, kiujn mi nun ne kuraĝas diri,

Mi **malaprobas** ĉiun ajn militan agon de la Registaro de Hispanio, kaj mi deklaras min mala al ĉiu perforta ago kontraŭ la popolo de Irako, kaj rekta kaj ŝajnigita de «kunflankaj efektoj», kiu estas la plej hipokrita esprimo per kiu oni kaŝas murdon de senkulpaj civiluloj.



Je la limo de katastrofo, paĝo 5-a


**Nº 58-a** **Aprilo/junio 2003**

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García.**
c/ Almenara, 17, 2ºB
30004 Murcia.
*Sekretario:* **José Pina Tuells.**
c/ St-a Teresa, 22-2CD
30005 Murcia.
*Kasistino:* **Carmen Hernández Valdés.**
Avdª Marín Esparta, 15-3ºA
30008 Murcia.
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Monato***, de Stefan Maul,
3 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
4 ***Sennaciulo***, de Kreŝimir Barkoviĉ,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***Liberecana Ligilo***, de Jakvo Schram,
10 ***Laŭte!***, de C. Baudé,
11 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
12 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
13 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi,
14 ***La verda proleto***, de komitato,
15 ***La Juna Penso***, de Vinko Markov.

Al ĉiuj, dankon pro viaj subteno kaj lernigo.


*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**




*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* ***nova konto*** de **La Caixa** *n-ro 2100 4455 71 0200022454. Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: *Deklaracio kontraŭ la milito.*

Oni povas **reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Enhavo


Averto al registaro ........ 1
Redaktore ........ 3
Informoj de la Prezidanto ........ 4
Je la limo de katastrofo ........ 5
Bonkora letero ........ 10
Kara amiko ........ 11
La prezo de l' konarkiro ........ 13
Televido kaŝas malsatulojn ........ 15
Strategio kontaŭnaska ........ 17
La faraono, 9-a ĉapitro ........ 20
La Pastro Ruĝa ........ 22
Statuto de SAT, paĝoj 8a kaj 9a ........ 24

# Redaktore:

Kiam ĉi tiu monatotrio komencis, ni ankoraŭ ne estis en milito. Nur minacis komenci milito. Milito estas nedezirinda afero, pro la malfeliĉo kaj regreso, kiujn ĝi kaŭzas.



Al tio ŝuldiĝas la mesaĝo al registaro de Hispanio, kiun oni povas legi sur nia kovrilo.

Mi memoras, ke dum la lastaj jaroj de la lasta jarcento, komencis la unua parto de tiu ĉi milito. Tiam la registaro sendis soldatojn hispanajn en la konflikton, kune kun militŝipoj kaj pafiloj. La partopreno hispana estis vere modesta tiam, kvankam ĝia kvino procento konsistis el subteno al militaviadiloj. Mi timis, ke nun ni vidos novan eldonon de tio. Oni povas memori pri tio en la paĝo http://www.pangea.org/edualter/material/palestina/golfo.html#española. Ĝis la momento, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, mi povas diri, ke la Registaro de Hispanio ankoraŭ ne aprobis agon sangan en tiu milito.

Tamen, la sinteno de Olga López pri la konflikto malsamas al tiu mia, sed ŝia tre klara artikolo pri ĝi, *Je la limo de katastrofo*, kiun oni povas legi en paĝo 5-a, estas malfacile kontraŭdirebla. Milito estas fia, sed ĝi, rezonas ŝi, ne estas la sola fia afero farebla. Ankaŭ, ne ĉiun militon oni povas taksi same, kaj ne ĉiu rakonto pri la sama milito estas same naiva, ekzakta, objektiva aŭ ĝusta. Ni legu ŝian artikolon, kaj decidu poste.

Amiko nia sendis leteron al ni pri la *grava krizo*, laŭ li, kiun nun travivas HALE. Mi hezitus ĉu publikigi la leteron ĉi tie, kaj ankaŭ ĝian respondon, kaj mi petis konsilon al kelkaj amikoj. Male al kelkaj konsiloj, mi preferis tion fari, ĉar la afero ne estis privata mia, ĉar ĝi rilatis al la asocio kaj al la magazino, kiu estas ĉies, de la anoj de HALE. Oni ne vidu en mia respondo atakon al iu ajn, sed nur defendon pri du aferoj tre karaj al mi, HALE kaj **Kajeroj el la Sudo.**

María Ángeles Giménez denuncas merkatismo pri ideoj en paĝo 13-a, kiu, mi esperas, elvokos reagojn.

Kontraŭimperiistoj certe dankos la artikolon de John Wells, kiu certe levigos reagojn. Sed certe reagojn kaŭzos la artikolo de G. Salvatierra (ne estas pseŭdonimo!), kiu parolas pri aborto. Eble oni trovos kelkajn ideojn tiajn iomete reakciaj, sed pro tio, ke ni estas toleremaj kaj akceptas diversecon pri penso, ni atendas viajn reagojn.

En paĝo 20-a ni legas pri Gedeono kaj Sara kaj sia *kronprinco* de Egipto, en la ĉapitro 9-a de ***La Faraono***.

Kaj la lasta artikolo de nia magazino, en paĝo 22-a, prezentas al ni plej gravan muzikiston de nia kulturo, Antonio Vivaldi, la *ruĝan pastron*, la armoniisto de centoj da melodioj, kiuj venis al ni de antaŭ preskaŭ kvar cent jaroj.

Mi esperas, ke vi ĝuu la bultenon, kiun vi nun legas, kaj —se vi estas ano de HALE— ankaŭ aŭskultas, ĉar ni inkluzivas diskon kun la sonoj de la elektronika versio de nia bulteno. Se la eksperimento estas sukcesa kaj dezirota, ni klopodos fari tion regule aŭ almenaŭ ofta.



# Informoj de la prezidanto

Estimataj samideanoj:

Denove la milito, milito kiun Hale rifuzas kaj pri kiu klariĝas sian sintenon en la unua paĝo de la nia bulteno.



Kiel progresema samideanoj, ni rifuzas la militon kaj ni apogas la liberesprimon, per kiu ni rifuzas la militon.

Mi devas rememori ke en la milito de Kosovo, **Kajeroj el la Sudo** estis la unua gazeto, en la esperanta movado, kiu donis voĉon a la serboj. Zoran Ciric (Krio el Jugoslavio, n-ro 43-a kaj La komenco de la milito, n-ro 44-a) kaj Vladimir Kirda Bolhorves (Poeto kaj poezio, n-ro 51-a) parolis pri la milito, kiun ili vidis, kaj parolis pri siaj personaj katastrofoj, sed en la ĵurnaloj oni atakis serbojn, kiuj ne povis diri sian opinion en la amaskomunikiloj. Sed en **Kajeroj el la Sudo**, ili parolis libere kaj abunde. Ĉu vi rememoras tion?

Sed nova milito iĝis monstro per si mem, kaj verŝajne ne multaj samideanoj apartigas la diversajn faktorojn, kiuj kaŭzas ĝin. Milito estas fia, punkto. Sed realo esta persista, kaj evidentiĝas, eĉ se oni tion ne ŝatas. En Hispanio okazas maldolĉaj aferoj, kiuj memorigas kelkajn pri la **Popolfronto** de la tridekaj jaroj de la lasta jarcento. Evidente, tio estas troigo. Sed ni notu, ke malforta dekstro kaj tro forta maldekstro iam estis danĝera koktelo, kiu mortigis la ŝtaton, kaj la afero finis en fian diktatorecon. Kio okazas? La reguloj de ludo estas, ke la partioj havu malsamajn ideojn, sed pensoj kaj personoj estu respektataj, kaj ankaŭ lokoj por kunveno. Mi rufuzas kompreni al kiu povas utili, ke la ejoj de la Popola Partio estu okupataj de personoj, kiuj diras sin mem maldekstraj kaj progresemaj, sed kies faŝisma sinteno vidigas sin per siaj pli ol 190 atakoj al sidejoj de alia partio politika. Kion oni dirus, se anstataŭ al socialisma partio, atakantoj apartenus al dekstraj partioj? Oni ne povas ne pensi pri la atakoj surstrataj de maldesktraj partianoj en la jaroj 30aj de la lasta jarcento. Tiam ankaŭ la unua paŝo al barbareco estis manko da respekto al la penso de aliaj personoj, kaj poste dua paŝo estis manko da respekto al la vivo de tiuj personoj.

Pro tio, ni kontraŭas militon, sed ni estas kritikaj ankaŭ al nemilito, al kaŭzoj de milito, kaj trovas, ke neniu senkulpas, eĉ ni, kiuj trankvile ripozas kaj trinkas kafon je niaj domoj, dum ke parto de nia junularo lasas sian vivon for de siaj hejmoj, nome de principoj de nia ekonomio, sed ankaŭ de nia kulturo. Plej facile estas simple kondamni militon, kaj ne veni en tiklajn cirkonstancojn, kiuj ĉirkaŭas, se ne kaŭzas, tiun militon.

Multaj samideanoj en nia sinteno ankaŭ rifuzas la militon, kiel **Sennaciulo**, kaj aliaj revuoj de la Esperanto Movado. Ni ne estas solaj, malkiel dum la milito de Kosovo.

En HALE, asocio de laboristoj kaj progresemaj viroj kaj virinoj, abundas nia interna demokratio. Kiel Prezidanto en la venonta rekontiĝo de la estraro mi prezentos duan planon: la elekton de la legantoj, kaj nian virtualan kongreson per interreto.

Ĉu oni povas diri pri alia asocio esperantista, ke simplaj legantoj de la bulteno havas reprezentanton en la estraro, kaj ke legantoj povas partopreni kaj baloti en interreta kongreso?

La legantoj de **Kajeroj el la Sudo** havos reprezentanton en la estraro kun la sama rajtoj kiel la ceteraj membroj de la estraro. Povas partopreni en baloto pri tiu reprezentanto ĉiuj legantoj de **Kajero el la Sudo**, kiu enskribiĝu en la listo, kiu aperos en la Esperanto Hispanio (http://www.iespana.es/esperanto). La tempolimo por baloto estas de hodiaŭ ĝis la 1-a de julio.

La Legantoj povos sendi lian voĉdonon per interreto a la adreso esperanto@iespana.es.

Ĉiam je via dispono,

**Johano Antono Cabezos Martínez**

# Je la limo de katastrofo

Oni vidas hodiaŭ, ke la registaro de Hispanio diras aferon, kiun kontraŭas la parto de la popolo hispana, kiu kuraĝas paroli pri la afero. Hodiaŭ ni ĉiuj estu pacemaj, kaj se ni ne estas pacemaj, ni estas krimuloj, malpacistoj, militistoj, kaj tiel plu. Oni ĉeestas je malagrabla spektaklo pri manko da debato kaj respekto al nekunhavata opinio. Tio estas la plej malriĉa trajto de la socio hispana je la komenco de la 20-a jarcento, evidente heredita de la lasta jarcento. Ankaŭ ni vidas, ke finfine demokratiaj landoj agas kontraŭ ŝtatoj, kies registaro ne respektas homajn rajtojn tiel, kiel oni pridifinis per la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Tion oni faris unue en Afganio, kaj nun oni minacas fari tion kontraŭ Irako. Sed etosoj memnomitaj progresivaj reagas *kontraŭ* tiu iniciato, ne favore al ĝi. Tiuj samaj homoj, kiuj plendis kontraŭ talibanoj pro tio, ke ili detruis antikvajn statuojn de Budho, tiuj, kiuj plendis kontraŭ neo de homaj rajtoj al virinoj en Afganio, plej frue kiel oni sciis, ke oni atakas Afganion, komencis kritiki akre kaj kondamni tiun militon..., ĉar tion primilitos Usono.

Kompreneble, Usono estas en plej favora pozicio fari tion, ĉar ĝi estas la sola restanta imperio en la mondo, ĝi havas la rimedojn fari tion, ĝi havas la ŝancon, kaj ĝi havas la volon fari tion. Oni kritikas ne la aferon, sed la intencojn. Sed kion faris Usono pri Afganio? Verŝajne, nun estas demokratia registaro en Afganio, aŭ almenaŭ pli-malpli demokratia registaro. Ĉu estas bone por Afganio havi demokration? Verŝajne, virinoj afganaj nun havas pli da libereco kaj rajton vivi kiel homaj estoj, post la terura diskriminacio kaj endomigo priskribita de stultaj talibanoj (malsukcesaj *studentoj pri la Kurano),* kiuj ne dubis murdi virinojn kaj samseksemulojn pro siaj religiaj antaŭjuĝoj. Tio ja finis en loko de mondo, kaj tio okazis *kontraŭ* la opinio de *progresemaj* asocioj, kelkaj el ili, aldone, sennaciismaj kaj homrajtdefendantaj.




Nun ni vidas, ke la mondo civilizita, estas dividita pri la afero Irako. La Unuiĝintaj Nacioj havas subite du fortajn blokojn: Francio, Germanio kaj Rusio, je unu flanko, kaj Usono,

Britio kaj Hispanio je la alia flanko. La ceteraj landoj restas en tria bloko, kaj ili ne rolas gravan parton en la afero, almenaŭ ĝis nun. Ili nur sopiras kaj deziras, ke la rolon de la UN-o neniu parto anstataŭu.

La problemo de Irako ne komencis kun la lasta *Milito de la Golfo*, je 1991. Multe pli frue, kiam Irano falis en manojn de religiaj integristoj, oni abunde armigis Irakon. La ideo estis, ke Irako kaj Irano detruu unu la alian favore al Okcidento. Tamen, neniu flanko sukcesis, malgraŭ granda buĉado ambaŭflanka. Rusio kaj Usono vendis armilojn al Irako, sed kiam ĝi petis atoman stacion, ambaŭ landoj rifuzis. Francoj venis, tamen, kaj vendis ĝin al Irako. Poste, izraelaj aviadiloj, sen antaŭa averto, detruis ĝin, ĉar tio, laŭ ili, endanĝerigus la situacion en la mezorienta parto, se ili uzus tiun radiaktivan materialon konstrui atombombon, kaj de tiu avantaĝa pozicio postuli aferojn neelteneblajn, kiel, ekzemple, la malapero de Izraelo. Germanio ankaŭ respondecas pri komerco kun Irako: ili vendis pesticidojn, kiujn irakanoj igintis ĥemiajn armilojn. Aldone, oni suspektas, ke Irako havas plej terurajn armilojn, bakteriajn bombojn. Tiuj bomboj povas mortigi vastajn partojn de la mondo sen tuŝi konstruaĵojn, industrion kaj vojosistemojn.

De 1991 oni postulis al Irako, ke ili detruu tiujn armilojn, kaj la UNo difinis kiujn armilojn ili rajtas havi por defendi



sian suverenan ŝtaton. Sed oni scias, ke irakanoj ne faris tion.

Je la pinto de la registaro de Irako estas diktatoro Saddam Hussein. Lia vorto estas leĝo tie, kaj irakanoj ne ĝuas tial demokratiecon aŭ homajn rajtojn. Oni scias nun, ekzemple, ke Saddam Hussein ordonis *finan solvon* pri la sendependismaj kurdoj je la nordo de la lando: oni gasigis grandan parton da ĝi. Kaj okcidento ne ŝatis, ke tion oni faris per germana gazo elŝutita de francaj kaj usonaj avidiloj, ĉar okcidentanoj vendintis ilin kiam ili celis, ke ili uzu ilin nur kontraŭ Irano. Tio estis la grava eraro de okcidento, kiun ĝi nun klopodas solvi.




Kial Francio kaj Rusio kontraŭas atakon kontraŭ Irako, kaj kial Usono, Britio kaj Hispanio –aŭ almenaŭ ties registaroj—favoras tion? Nu, Francio konas terorismon nur kiel spektanto: dum dekoj da jaroj teroristoj de ETA murdis en Hispanio, kaj poste ili kuris serĉi sanktejon en Francio. Francoj diris, ke ili ne miksiĝu en hispana afero, ĉar, aldone, ne estis demokratio en Hispanio. Sed post 1978 demokratio venis kaj jam estis ŝanĝo en la sinteno de Francio, kvankam terorismon oni ankoraŭ ne finis venki.

Alian sintenon havas la Registaro de Hispanio, evidente, ĉar la sama sangavida grupo, naciistoj de ETA, daŭre mortigas en demokrata lando. Ankaŭ en Britio ekzistas organizo terorisma, IRA, kaj Usono suferis la plej gravan baton en sia historio per la disfalo de la Ĝemelaj Turoj, fare de fanatikaj islamanoj. Ĝi armigis ilin ideologie, supozeble, kontraŭ Sovetunio, sed poste, ili havante armilojn kaj kaŭzon propran, ili agis kontraŭ la Centro de Monda Komerco, kiu sidiĝis en tiuj turoj.


Kio okazos nun? Se oni aŭskultas niajn gvidantojn, ili ja deziras pacon. Sed ili ne deziras pacon kun timo. Ili scias, ke estas kelkaj ŝtatoj en la mondo, kiuj havas eblecon mortigi amasojn da homoj sendiskriminacie. Ili sentas sin respondecaj pri tiu situacio, kaj ili deziras solvi ĝin. Mi opinias, ke ili vere estas sinceraj. Sufiĉis al mi aŭskulti la argumentojn de la Prezidanto de Hispanio en la Parlamento, ĉar mi opinias, ke ili estas logikaj kaj bonintencaj. Kiom da fojoj oni aŭdis surstrate, ke la plej bona afero fari pri teroristoj estas mortigi ilin? Tio ŝajnas barbare, ĉu ne? Tamen, estas logike pensi, ke teroristo estas homo por kiu mortigo estas nur ilo por atingi sian celon. Do, se li ne respektas homan vivon, kial oni respektu lian vivon? Jes, mi scias, ke oni diras, ke se oni ne povas mortigi, ŝtato ankaŭ ne povas mortigi. Se mortigo estas kontraŭetike, ŝtato ne povas mortigi. Nu, ŝtato devas garantii vivon al civitanoj, kiuj subtenas la

ŝtaton. Ŝtato estas nenio sen la civitano, kiel mi legis laste en la interreta paĝo de ĉi tiu revuo. Sekve, ŝtato devas fari kion ajn por certigi, ke la civitanoj, kiuj pagas impoŝtojn kaj plenumas la leĝojn de tiu ŝtato, povu vivi trankvile en la teritorio de tiu ŝtato, kaj sen timi ĉu morgaŭ oni ankoraŭ vivos. Mortigi teroristojn eble ne estas etike, sed ĝi estus efike. Ĉar niaj teroristoj estas malkuraĝaj homoj, kiuj mortigas sendefendajn homojn, sed kiam polico haltigas ilin, ili ŝafe sin donas. Mi ne postulas al ŝtato, ke ĝi estu etika, sed mi ja postulas al ĝi, ke ĝi estu ĝusta kaj protektu min. Mi eĉ pretas konsenti pri tio, ke la sango de teroristoj falu sur min kaj sur miajn gefilojn. Certe ili multe gajnos per tio, ke ilia, ne mia, sango falu sur ilin. Mi donis vivon al ili, dum ke teroristoj povas oferti nur morton al ili. Ĉu ni elektu saĝe inter vivo kaj morto?



Ataki Irakon celante malarmigi ĝin povas esti militeska afero, kaj, sekve, ne estas facile defendebla etike, sed kio pri efiko? Ni estu bonaj kaj bonpensantaj, kaj ne kondamnu Husejnon sen pruvoj. Sed..., ĉu oni aŭskultu al tiuj malestimindaj homoj, kiuj disvendis povajn armilojn al li? Usono vendis armilojn al Irako en la pasinto, kaj pro tio ĝi ja kulpas. Ĉu ni kredu je pento en homoj, eĉ se ne sinceraj kaj ne venante de etikaj konsideroj, sed nur de timo, ĉu oni pensu, ke oni povas disvolviĝi en sia penso kaj ŝanĝi pri gravaj aferoj, kaj taksi subite, ke oni eraris, kaj ke oni havas la devon –ne antaŭe konsiderata— pri tio, ke oni malfaru tion, kion oni misfaris? Ĉu usonanoj ankaŭ rajtas maldoni danĝerajn armilojn al tiu, kiun ili donis iam? Ĉu gefiloj respondecas pri la misfaroj de siaj gepatroj, kiel en mezepoko oni kredis? Se tion oni konsideras hodiaŭ stultaĵo danĝera, kial oni kulpu Buŝon 2-an pro tio, kion faris Carter aŭ Reagan, eĉ Buŝo 1-a? Ĉu estas defendinda, ke kulpas demokrata registaro dekstra de José María Aznar pri tio, kion faris la nedemokrata registaro de Francisco Franco, kiu honorigis Husejnon, donante al li Krucon de Isabel' *la Katolika*?


Eble pri Usono temas nun ŝanĝo de interesoj, sed homaj situacioj tre malofte estas simplaj kaj puraj, kaj kontraŭante malarmiligon de Irako nun estas kontraŭ liberecon –eĉ se neperfektan—por la popolo iraka. Ŝajnas moke, ke partioj tradicie defendantaj liberecon kaj homajn rajtojn, kiel Unuiĝinta Maldekstro kaj Partio Socialisma Laborista Hispana tiom arde kontraŭas militon liberigan en Irakon; tiom multe, ĉar antaŭ 70 jaroj ili favoris revolucion en Hispanio, ili celis detrui la nacian senton –eĉ nun ili tion favoras kaŝe, kion oni vidas per ilia duonapogo al regionismaj partioj en Vaskolando kaj Katalunio—, kiam ili celis fondi la



Popolan Respublikon de Hispanio, kaj tion celante ili detruis la Duan Hispanan Respublikon en 1936, tial rajtigante la puĉon de Francisco Franco. Nun analizistoj de tiuj fifamaj eventoj konkludas, ke se ne ekzistintus tiu revolucio, Franco neniam iĝintus diktatoro, kaj la popolo hispana ne suferintus 40 jarojn de regreso. Tiam tiuj partioj esprimis malamon al dekstraj partioj, kaj nun ili daŭre lasas sian malestimon blindigi objektivan takson pri tiu ĉi milito.

Aliflanke, ni ĉeestas absurdan eventon: la Unuiĝintaj Nacioj deklaras, ke la inspektoroj daŭre laboru, kaj ili iom post iom tute senarmiligu ditkatoron de Irako. Usono, Britio kaj Hispanio –ties registaroj, mi ripetas—diras, ke 12 jaroj ja sufiĉas, kaj ili ne permesos, ke Husejno daŭre primoku la ceterajn landojn de la mondo. Krome, ili deziras eviti, ke aliaj diktatoroj en la mondo sekvu la ekzemplon de Irako. Sekve, la akso UsBriHi, helpate nun de Bulgario, almenaŭ morale, avertis, ke se la senarmiligo ne estas kompleta je la 17-a de marto, milito okazos. Se finfine estos milito (mi verkas ĉi tiun artikolon la 8an de marto, ĵus post diskuto de la Raporto Blix en UNo), dependante el tio, kio okazos finfine, la movo usbrihia aŭ de la Triobla Alianco, estontis ĉu senprudenta, ĉu oportuna; ĉu hasta ĉu justa; ĉu faŝisma, ĉu savinta; sed ĉiokaze, ĝi estontos senarmiliga kaj kontraŭterorisma. Ĝi estontos eble senjura ago de la registaro de Hispanio kontraŭ teroristoj, sed laŭ la doktrino de Britio kontraŭ terorismo, kiun ĝi sekvis en Nordirlando (armea invado kaj ago en terorisma lando). Usono sekvas sian linion de la unua momento, kompreneble: ĉasado de la teroristo kie ajn li aŭ ŝi kaŝu en la mondo.

Kaj mi aldonu fine, ke tion farante, la Triobla Alianco ne nur savos siajn registarojn de estonta biologia aŭ ĥemia milito de Irako kaj aliaj malgrandaj grupoj da teroristoj, sed ankaŭ al tiu bonintencaj civitanoj, kiuj kontraŭas la militon nun. Tio, ke ili povu kontraŭu publike la agon de siaj registaroj, estas unu el la plej defendindaj trajtoj de demokratia sistemo. Tamen, vere ĉagrenas min, ke samtempe, tio estas pruvo, ke la plej alta grado de demokratio estas tiu blanka ĉeko, kiun civitanoj de demokrataj landoj donas al siaj registaroj ĉiun kvarjarperiodon. Tio ŝajnas esti morto de rekta demokratio... Tamen, demagogio nuna ŝajnas pruvi, ke plia grado da demokratio estas neeble.



Placo de Paradiso: faligo de statuo de la diktatoro

*Olga López*

# Bonkora letero

*Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis leteron de esperantisto, kiun mi multe respektas de multaj jaroj kaj kies amikecon mi kulturas de longe. Mi transskribas ĝin:*

Al estraro kaj anaro de H.A.L.E. loĝanta en Murcio.

Kara amiko! Post ioma pensado pri la AFERO H.A.L.E. mi venas al konkludo, ke estus oportune ne plu daŭrigi, kverelon, kontraŭopiniojn kaj eĉ disputon (kompreneble tiuj substantivoj nur estas respondecaj de la kontraŭopinianto).

Laŭ ordinara kalkulo la afero estas facile solvebla kaj mi alprenas ĝin laŭ via flanko:

De nun vi devas publikigi, deklari, diskonigi ke vi (la estraro) *nun ne plu deziras polemikon kaj ĉio lasas al nova L.E.A. komitato kiu estas nun starigota, eĉ pli, laŭvole ni aniĝos al niova komitato. Ni, la nuna estraro, ne plu estas tia kaj eĉ la bultenon aŭ magazinon "Kajeroj el la Sudo" ni ne plu aperigos.*

*Ni venis al tiu konkludo por la fruktodono de la esence Esperanto-Movado, ni ĉiuj povos klopodi kun plia interharmonio en la antaŭenigo de nia celo.*

*Aparte mi kiel nuna redaktoro, cetera estraro kaj kroma kamaradoj, samideanoj projektas aperigi novan eldonon de magazino kies titolo ni pripensos..., kiel LIBERA TRIBUNO...., ktp, en kiuj oni povos diskonigi ĉiujn artikolojn kaj opiniojn de la inskribitoj kaj legantoj, krome la jarkotizo estos atingebla al plej multo da samideanoj.*

*Nia findecido baziĝas en la afero ke pluraj esperantistoj kiuj ne nur deziras informiĝi pri nura S.A.T.ecaj argumentoj sed ankaŭ pri longa diversmaterialoj kiuj povas elpruvi kaj entuziasmigi la legantaron. Mem kompreneble el aniĝi al nova magazino rilatas nenion kun la membroj de L.E.A.oj, ĉiu laŭ vole.*

Ni esperas kaj deziras la realigon de tiu ĉi projekto.

Tiu simpla sed efektiva solvo mi pensas por malaperigi kontinuecon de solvoj kaj malsolvoj.

Alie mi pensas, ke Jesuo estas tre verkema kaj tre kompetenta esperantisto por eldoni ĉu monate, du, tri monate esperantan magazinon. Ankaŭ mi fidas al lia diverseco en la enhavo de la revuo, plie kun la helpo de prezidanto nuna kaj ceteraj kunlaborantoj kiuj nuntempe aperas en la magazino kaj certe daŭrigos en kunlaboro.

Ĉu mi fantazias, iluzias, aŭ elreviĝas?

*La subskribinto povus esti ĉiu ajn, kiu diris laste, ke* li ne volas elekti inter du flankoj. *Plej altan servon mi faras al li ne dirante lian nomon...*

*Jen mia respondo:*

# *Kara amiko!*

Koran dankon pripensi kaj zorgi pri niaj problemoj pri SAT kaj ties anoj. Ankaŭ dankon pro tio, ke vi estas je nia flanko, kaj vi zorgas pri nia konforto kaj bonfarto. Dankon ankaŭ pro via sopirado al socio sen problemoj aŭ polemikoj, al socio aŭ asocio sen disputo, diskuto, ĉagreno, malsamo pri opinio, kaj alia ajn trajto, kiu povus disigi homojn, kiuj, laŭ vi, nepre estas bonaj. Ili ĉiuj. Aŭ ni ĉiuj.

Tiusence, Sadam Hussein estas fia homo, ĉar li ne volas donaci petrolputojn al usonanoj. Se li tion farus, diskuto, disputo, ĉagreno, polemiko, kaj aliaj malbonoj de milito ne okazus. Ĉar rajto estas stultaĵo, kiam oni povas vivi sen diskuti, disputi, ĉagreni, kaj tiel plu. Aliflanke, virinoj ne diskutu, se ili devas kaŝi siajn vizaĝojn. Laboristoj ne plu postulu pli altan salajron, ĉar tio estas diskuto, disputo, ĉagreno, kaj tiel plu. Kio estas mondo sen diskuto? Laŭ viaj sencaj vortoj, nur paradizo.

Tamen, mi opinias, ke la tradicio laborista estas korekta kaj prava: oni striku, oni disputu, oni postulu, ke oni agnosku oniajn rajtojn kaj honoron. Disputo, diskuto, ĉagreno, kaj aliaj aferoj kutime faritaj de maldekstrularo, laŭ mia kono kaj sinteno, ja estas pravigeblaj kaj uzendaj. Ili estas motoroj, kiuj ebligas progreson.

Pro tio, ke vi kaj mi kunhavis mirindajn momentojn dum mia esperantista vivo, mi venkas tiun ĉi senton, kiun mi ĵus nun havas, ke vi grave insultas min per via senpripensita letero, kaj mi klopodos klarigi al vi kial via letero estas politike manipulacianta kaj malkuraĝa, se ne hipokriteca kaj rekte fia.

Ni, la estrarto de HALE, kaj la asocio mem, estas tie, kie ni ĉiam estis, iom post iom progresante en nia demokratieco kaj zorgo pri niaj celoj. Ni celas progresi kaj progresigi Esperanton en la laborista medio. Ni kverelas kun neniu, sed ni ne malantaŭen iras kiam oni decidu kvereli kontraŭ ni. Ni estas tiaj, kiaj ni estas. Se ni defendas liberesprimon eĉ je la grado, ke faŝistoj ankaŭ esprimu sian opinion, ni ne komprenas, ke memdiritaj maldekstruloj neigu rajton sinesprimi homon, eĉ se li estas faŝisma. Homo kiu havas ion diri, se ne aŭskultata kaj kontraŭdirata argumente, finfine devos esti kontraŭdirata bate. Eble tion celas tiuj "maldekstruloj" de vi tiom mallerte defendataj. Unu el tiuj maldekstruloj diris al mi iam, ke falangistoj ne havas rajton vivi. Li ne pafis falangistojn dum la milito hispana, tamen, mi kredas. Sed mi ne kritikas lin pro tio, sed pro la sensenca sinteno, kiun li esprimis dirante tiun frazon al mi. Se maldekstro sopiras al mortigo de homoj –eĉ se dekstrajn— mi volas havi nenion rilate al tiu maldekstro. Tamen, murdistoj ne bone enkadriĝas sin en maldekstro.

Ni estas tie, kie ni ĉiam estis, mi diras. Estas aliaj, kiuj venas nome de Sankta SAT ataki nin, kaj dubas pri nia SATeco, pri nia celoj, kaj kondamnas nian kritikadon, ĉar oni ne kritiku Sanktan SATn. Ĝi estu kvazaŭ Dio, kiu estas ĉiel bona. Tamen, ni neniam kritikis SATn. Ni kritikis misfarojn, kiujn difinitaj homoj faris volante helpi SAT. Mi opinias, ke SAT estus pli bone sen tiuj homoj.

Kelkaj tiuj amikoj viaj, kiuj ne rekte agas aŭ parolas, tute rifuzas diskuton, eĉ dialogon. Ili, verŝajne, estas puraj, kaj ili ne deziras miksiĝi kun malpuraj uloj. Pekuloj pentu kaj venu al ili, kiuj estas en la bona vojo perdifine. Ili devas klarigi nenion, ili devas proponi nenion, ili devas fari nenion. Oni simple petu, ke ili kompatu al ni, pekuloj grandaj.

Nu, mi devas diri al Sankta Marteno, al Sankta Ĵakvo kaj simile al Sankta Petro kaj Sankta Tonjo, ke mi fieras, ke mi pekas. Miaj pekoj estas benataj, inter alie,

de la Statuto ne nur de HALE, sed ankaŭ de tiu de SAT. Sed se miaj pekoj ne estus prostatutaj, sed kontraŭstatutaj, mi ankoraŭ prifajfus pri la kialoj kaj sintenoj de tiuj novaj evangeliistoj, kiaj ajn ili estu. Ili ne estas malamikoj miaj, kompreneble. Mi neniam agnoskos tiun kvaropon kiel malamikojn miajn, ĉar —kiel memorigis nin genia Oscar Wilde iam—, la gravecon de homo mezuras tiu de malamikoj liaj, kaj mi esperas, ke mi estu pli grava ol ili intencis fari min. Mi konsideras ilin kvar kiel etajn infanojn, kiuj rifuzas ludi kun mi. Ili havas, verŝajne, neniun seriozan argumenton, nur tion, ke ili ne ŝatas min. Eble mi faris ion, kio ne plaĉas al ili. Eble. Ili ludu en alia kampo, kaj ili ne akceptu min en sia teamo, se ili volas. Mi jam esprimis mian deziron aparteni al ilia nova teamo, sed ili ne volas akcepti min. Ŝajnas, ke aliaj kunludantoj iliaj demandas al ili pri iliaj veraj kialoj ne akcepti min, kaj ili finfine diras, ke oni diskutos tion dum la Kongreso de HEF en Valensjo, ŝajne en asembleo de la nova asocio.




Laŭ via letero, malnova amiko mia, ŝajnas, ke ***Kajeroj el la Sudo*** estas malkonvena al tiuj homoj. Nia magazino tute ne havas cenzuron, kaj ĝin havos neniam, dum ke mi redaktos ĝin. Vi petas, ke mi renoncu al ĝi, kaj mi fondu novan. Mi promesis al la antaŭa redaktoro de la magazino, S-ro Marco Botella, ke mi redaktos ĝin almenaŭ dum la venontaj 40 jaroj, kaj mi vere ne havas kialon malhonori mian promeson. Nur morto povus senkulpigi min pri tio. Sed ni analizu la unuajn 29 numerojn kaj la sekvantajn 29, kaj ni kalkulu en kiu kolekto estas pli da analizo pri laboristaj temoj, pli da klerigaj artikoloj, pli da temoj pri Esperanto viva... Mi ne kritikas Marcon Botellan, kaj mi fakte konsideras lin majstro mia. Eble li neniam devintus lasi la redakton de la magazino, sed, tamen, li elektis lasi ĝin, kaj mi akceptis ĝin kiel filon mian. Ĉu vi mortigus vian filon pro tio, ke paco kun via najbaro estu garantiita? Baton al najbaro, donus mi!


Vi ankaŭ parolas pri jarkotizo, kiu estu atingebla por samideanoj. Nu, 5 eŭroj estas la plej malalta kotizo en kaj ekster la Esperanta Movado por magazino. Aldone, ĝi havas interretan version, kiu estas tute senpaga. Laste HALE donacis voĉon al simpla leganto de ***Kajeroj el la Sudo***, dum ke malburĝa asocio neas voĉon eĉ al ano de sia Ĝenerala Konsilantaro.

Vi ankaŭ parolas pri fruktodono. Kian fruktodonon vi priparolas, kara amiko? Ĉu venomigitan frukton da fifamigo, malĝusta atako, malestima fidiraĵo, aĉa vortfarado kontraŭhereza? Tamen..., herezulo estas mi. Mi estas nigra ŝafo, dum ke mi ne iĝos lupon. Ĉar se mi estus vera lupo, tiuj infanoj kurus kaj silentus, anstataŭ manipulacii kaj mensogi al honestaj esperantistoj. Sed ni donu tempon al tempo. Oni lernas per batoj. Kaj kelkaj sukcesas lerni rapide...

Mi konkludas, kara amiko, dirante, ke vere vi pravas: vi iluzias, vi elreviĝas, vi fantazias, opiniante, ke homoj estas bonaj. Jam Zamenhof diris iam, ke homoj ne estas anĝeloj, kaj Esperanto ne plibonigas homojn necese. Mi sendas vin legi la faman francan rakonton pri la fosilo, kiun ni publikigis en n-ro 32-a de nia magazino. Mi, dume, daŭrigos mian fosadon, dum ke aliaj diskutas ĉu la fosilo taŭgas aŭ maltaŭgas, ĉu oni plibonigu ĝin, ĉu oni vere fosu aŭ ne necesas. Iam, kiam mi jam fosis sufiĉe, la foso estos sufiĉe granda, kaj ili ja povos veni kaj endomiĝi en ĝin. Mi, simple, malfosos la teron kaj entombigos ilin. *Requiescat in Pacem. Amen.*

# La prezo de l' Konakiro

Casper Gutman (kasper gutman) estas gangstero kun klera sinesprimo kaj kondutmaniero neriproĉebla: jen rolulo de l' romano ***La malta falkono***, de Dashiell Hammet (daŝjel hamet), kiu pretas eĉ murdi por atingi valoregan figuron el oro kaj gemoj. Kiam oni pridemandas lin rilate lian posedrajton sur juvelo, li respondas, ke objekto tiom valora apartenas sendube al tiu, kiu ĝin sukcesas alpreni. Tiu ĉi ŝajnas esti la filozofio subkaŝita de la nuntempa sistemo de patentoj; la scion por tiu, kiu kapablas alproprigi ĝin. El tio ĉi devenas la pereiga koncepto de la intelektaĵaj propraĵoj (patentoj), ĵaluze defendata de la Monda Porkomerca Organizaĵo (MPC). Laŭ Noam Ĉomski, la "rajtoj pri patentoj estas nenio pli ol la kontrolprotektado garantianta al la superkorporacioj sian rajton enspezi monopolajn prezojn". Li ankaŭ denuncias la korporaciojn kiuj strebas patenti produktaĵojn argumentante, ke ili malkovris ilin, kaŝante la fakton, ke por sukcesi je siaj esploradoj ili devis uzi kiel fundamentajn sciojn kaj eltrovaĵojn, biologiajn kaj sciencajn, akiritajn per publika mono kaj kadre de publikaj institucioj.



Ekzistas patentoj ekde pluraj jarcentoj, sed en la okdekaj jaroj, la riĉaj landoj nervoziĝis ĉar aziaj ŝtatoj ekestis ties konkurantoj ĉar tiuj ĉi povis imiti ilin kaj vendi siajn varojn pli malmultekoste. Tiam kaj tial, la nordanoj utiligis MPCD-on kiel sistemon por turnigi la situacion kiel dekomencen, elepensante la prikomercajn patentojn "trips"-ojn: jen maniero bremsi la sudorientajn aziajn evoluantajn landojn kaj malutili la malriĉajn landojn.

*Pli ol du mil milionoj da homoj ne kapablas akiri medicinilojn*

La civitanoj ekkonis la avidecon kaj la moralan mizeron de la nordanoj rilate aferon de la konflikto inter mediciniloj kun komercaj markonomoj kaj tiuj senmarkaj (pli malplikostaj) por esti uzataj okaze de sanakcidentoj: Svisio, Kanado, Usono, Aŭstralio kaj Japanio montriĝis kontraŭaj al la permeso de la MPC por uzado de mediciniloj senmarkaj por lukti kontraŭ AISO (akirita imundeficita simptomaro), argumentinte, ke la patentorajtoj de la famaciaj kompanioj plu validas (post 20 jaroj!) Fortega internacia premoebligis akordon por fabrikado de senmarkaj mediciniloj, sen pagi patentorajtojn, kvankam kun dubesencaj postuloj. Tiu ĉi pruvo pri avareco okazis en mondo, kie ĉiujare mortas 17 milionoj da personoj pro malebleco atingi medicinilojn, laŭ Kuracistoj Sen Landlimoj, kaj Monda Prisana Organizaĵo (MPS). Spiraj infektoj, la malario, la AISO, la tuberkulozo, kaj priseksaj malsanoj dekonumas la malriĉajn landojn ĉar la mediciniloj havas troaltajn prezojn En Eŭropo, medicinado de pneŭmonio pere de antibiotikoj samkostas kiel 2 aŭ 3 horoj de la salajro averaĝa, dum en Afriko ĝi samkostas kiel monaton. Unu triono el la monda loĝantaro ne kapablas akiri medicinilojn.

La superkorporacioj farmaciaj diras, ke la nuna patentosistemo garantias financadon al la esploradoj tiufakaj, sed, laŭ MPO, ili nur dediĉas 0'1 procenton de siaj esploraj fondusoj al serĉado de iu ajn produktaĵo kontraŭ, ekzemple, malario; malgraŭ ke la malario (nekonata delonge en la riĉaj landoj) okazigas 500

milionoj da malsanuloj en la mondo kaj estas la kialo de 3 procento el la forpasoj en la malriĉaj landoj. Aliflanke, la grandaj laboratoriaj firmaoj nur produktas unu procenton el la mediciniloj kontraŭ tropikaj malsanoj kaj apenaŭ dediĉas dek procenton el la monda esplorinvesto rilate 90 procento el la mondaj sanfakaj problemoj, kiel denunciis Globa Forumo por Esplorado Sanfaka.

La malcedema kaj avida intelektaĵa propraĵa sistemo, gardata de MPC, ne nur koncernas la medicinilojn, sed ankaŭ al la naturaj rimedoj tiaj kiaj plantoj, bestoj kaj mikrobioj, kiuj estas antaŭ la vidpunkto de la transnaciaj korporacioj. Tiuj ĉi korporacioj, ne nur rifuzas iujn medicinilojn parapetitaj je siaj patentoj, sed ankaŭ ekspluatas la landojn malriĉajn (kvankam riĉaj je naturaj rimedoj): ili sendas siajn direktistojn traserĉistojn scii kiuj plantoj semoj aŭ mikroboj el la malriĉaj landoj povas esti ege monprofitataj. S.-ro Cees J. Hamelinck, profesoro ĉe la Unversitato de Amsterdamo, denunciis, ke "en pluraj landoj malriĉaj oni profitas la lokajn konojn por fabriki medicinilojn ege monprofitajn, sen la informita konsento de la tieaj loĝantoj".

*Oni profitas la lokajn konojn por fabriki medicinilojn monprofite sen la informita konsento de la tieaj loĝantoj*

Jen esas horo reklamacii la rajtojn de la lokaj loĝantoj sur la naturaj rimedoj de siaj teritorioj; ĉar ili estas partoj kun kiuj rubriki forrabajn kontraktojn, sed rajtantoj rilate siajn teritoriojn. En la Forumo Indiĝena pri Biologia Diverseco, celebrita en Nederlando, oni proklamaciis, ke 600 milionoj de indiĝenoj, kaj ne la ŝtatoj, estas mastroj de la genetikaj rimedoj elprenotaj de la plantoj kaj bestoj el siaj teritorioj. La indiĝenoj ne estas luigantoj, sed posedantoj de siaj teritorioj.

La hispana naturfakulo Joaquín Arriola (ĥoiakin' arjola) estas denunciinta, ke la monopolo de l' patentoj profite al la nordaj landoj estas unu el la faktoroj, kiuj malhelpas la industriigon de sudaj landoj. S-ro Cees Hamlinck verkis por periodaĵo de UN (Unuiĝintaj Nacioj), ke "estas ĉiutage pliaj pruvoj rilate la _klaŭzojn de Monda Porkomerca Organizaĵo pri patentoj, kiel bremsiloj kontraŭ la genezado de novaj scioj ĉe la asocioj evoluantaj, kio kuraĝigas la forrabadon de la sudlandaj rimedoj. La interŝanĝo de naturrespekta teknologio estas necesa por superi la malriĉecon de la sudaj landoj. La nuna patentosistemo estas por tiuj ĉi bazo nesaltebla".

La konorajto estas tro esenca por la homoj, tial oni ne permesu ke ĝi dependu de la kaprico de la ekonomiaj potencoj. Tial, la raporto de la UN pri ekonomia evoluo de 1999 **prezentis la konon kiel novan homaran patrobienon** kaj **bazon nepran por la evoluo de la socioj. Ĉio ĉi devigas nin rifuzi la nunan patentosistemon**.

*María Ángeles Giménez*
*(de Grupo Solidareco)*



# Imperiismo.- La Televido kaŝas la Malsatulojn

Unu el la plej grandaj ironiaĵoj de l' imperiismo estas, ke ju pli da informoj ni ricevas, des malpli ni scias pri la ceteruloj. Kiam niaj vivoj pli kaj pli interligiĝas kun tiuj de la gentoj el la plej foraj lokoj de l' nia planedo, niaj amaskomunikiloj —pere de kiuj plejmulto el la homoj loĝantaj en la riĉaj landoj ricevas siajn raportojn— estas pritraktante la ceterajn monderojn kvazaŭ se ili estus nur ludejoj por homoj tiaj, kiaj ni estas. Nia komprenokapablo malpliiĝas samgrade, kaj jen la momento, kiam ni nur scias pri la eksterlandanoj, ke ili subite kaj neeksplikeble atakas nin. Tia ĉi estas la tragedio, ne nur por la murditoj kaj vunditoj de la atenco kontraŭ Klubo Sari (en Insulo Bari, de Indonezio), sed ankaŭ pro la kresko de l' timo, malamo, kaj miskompreno al la gentoj de la Tria Mondo.



La pasintan jaron la kvanto da programoj pri landoj de la Tria Mondo sur la brita televido malpliiĝis ĝis la plej malalta nivelo el la lastaj 12 jaroj. Dum la elsendohoroj de internaciaj programoj kreskis malrapide, preskaŭ ĉiuj el ili temis pri realvivaj spektakloj (tiel nomitaj *rjaliti ŝoŭs*) kulebronoj (aŭ saponaj operoj, tio estas, longa serio de programoj por radio aŭ televido, kiuj temas pri la amaj kaj malamaj aventuroj de membroj de ordinaraj familioj, aŭ klanoj kaj siaj amikoj aŭ malamikoj, erotikaĵoj, diboĉado aŭ similaj merdoj narkotaj rilate kiel la britoj idiotas en ekzotaj lokoj. En la tuta jaro, nur 4 programoj pri la politikoj de l' Tria Mondo estas elsenditaj en la kvin ĉefaj televidkompanioj.

Multo el kio ni vidas pri la cetera mondo sur televidilo povas esti juste difinata kiel kontraŭinforma. Loĝantoj tiaj, kiaj la tieanoj kiujn nin permesas rigardi la vojaĝobroŝuroj, ŝajnas esti metitaj sur la tero nur por amuzi al ni. Multaj dokument-raportoj pri la sovaĝa vivo priskribas la regionojn koncernatajn kvazaŭ neloĝataj. Je la komenco de l' pasinta jaro, Kanalo + (privata hispana televido kodigita, kies ĉefposedanto estas la itala amaskomunikila potenculo Silvjo Berluskoni) elsendis triraportan serion pri Kongo, kiu gajnos premion de la Hispana Reĝa Societo por la Sciencoj kaj la Naturhistorio. En ĝi la ekzisto de homoj tieaj estis koncize montrata, sed

la serio informis nin pri tio, ke Kongo "iam koro de malheleco" estas nun "luma loko": jen stranga kvalifiko por loko detruita de civila milito, kie 3 milionoj da homoj estis mortintaj. Tiu ĉi milito kaj siaj kruelaĵoj ne estis menciataj.

La televidaj direktisioj plendas, ke la programoj pripolitikaj rilate forajn mondopartojn allogas malgrandajn aŭdiencojn. Tio ĉi estas vero, se oni komparas ilin kun programoj plejaŭdiencaj kiel "Granda Frato" (temas ĝi pri la ĉiutaga vivo de ordinaruloj nekonataj unu de la aliaj, izolitaj en domo, kiun pruntedonis la televidestroj, dum ili estas konstante filmataj sen intimecaj rajtoj, eĉ kiam ili dormas, fekas, baniĝas aŭ koitas…) Sed dum pluraj milionoj da televidrigardantoj kapablas sidi rezigne antaŭ tia skorio, aŭ almenaŭ forlasi la televidilon dum ili faras ion ajn pli interesa, estas malpli nombraj tiuj, kiuj rigardas seriozajn fremdlandajn dokumentoraportojn, kiuj kapablas pasie allogi ilin. La filmo de Jon Pilger (ĝon pilĝer) pri Orienta Timorinsulo kaptis la atanton de 3 milionoj da televidrigardantoj, el kiuj eksterordinara duonmiliono poste telefonis por sciigi siajn ĉagrenon kaj kolero pri kio ili estis rigardantaj. Estus juste diri, ke la programo ŝanĝis la itineron de la historio.

Sed tiaj ĉi filmoj estas relative multekostaj kaj ne tre ŝatataj de la anoncistoj. Ili ankaŭ povas estigi problemojn al la homoj, kiuj funkciigas la informretojn. Kiam la lasta dokumentraporto de Pilger por Carlton-televido, rilate la maljustecon suferitan de la palestina popolo, estis —sufiĉe antaŭvideble— atakata de l' organizita premgrupo HonestReporting (tio estas, honesta riportado), la bienposedanto de l' televido, Michael Green (majkel griin) panikis kaj denunciis la raporton kiel "tragedion por Israelo rilate la precizecon". Li estis kolere kontraŭdirata de la direktoro pri programoj surbaziĝintaj je faktoj de Carlton. Sed tioma kuraĝo estas malofta inter la televidaj direktistoj. La fizikan kuraĝon de la kameristoj kaj ĵurnalistoj sendependaj, kiuj riskas siajn proprajn vivojn por filmi la kruelaĵojn forgesitaj de la mondo, nur egalas la malkuraĝa moralo de la estroj, kiuj tiam rifuzas eĉ paroli al ili, lasante ilin solaj por fari la filmadojn. Antaŭ nelonge la kameristoj esploristoj havis, kiel ĉefan problemon, la teĥnikan: la kamera ekipaĵo estis malkomforta, la gravuraĵoj estis tre rompeblaj, la transporto estis riska.

Tiuj ĉi problemoj estas nuntempe preterpasitaj; ĝuste kiam la merkato por ties filmaĵoj estas malaperintaj.

**Estas jam tempo konvertiĝi al interaktivaj televidrigardantoj kaj ekpostuli malpli da "televido nereala" kaj pli da simpla realo**. Alimaniere, ni povas esperi ke la mondo daŭrigos donante nin surprizoj ju pli maldiafanaj siaj gentoj estas por ni.

*J. Wells.*

# Strategio Kontraŭnaska de la Internaciaj Organizoj por Kontroli al la Landoj Iberamerikaj La Aborto kiel Murdilo de la Malriĉiĝintoj.

La semajnon de la 11-a al la 15-a de novembro de 2002 enregis en Nikaragvo la leĝo pri Sano Ĝenerala, aprobita de la Nacia Asembleo. Ĉileĝo estis proponata de la Monda Banko (MB) kaj la Fondusa Valuta Internacia (FVI, FMI) al la Ministerio pri Sano (MINSA), nepublike, en la Centra Banko de Nikaragvo.

Ĉileĝo celas privatigi la sanservojn en Nikraragvo. Ĝin oni ŝuldas al tio, ke la premoj de FVI, la MB kaj la agentaroj de l' Unuiĝintaj Nacioj devigis Nikaragvon, samkiel al aliaj landoj de Iberameriko, privatigi la ĉefajn servojn kiuj estis provizataj de l' Ŝtato, tiaj kiaj la distribuado de elektra energio, la telefonreto, la pensioj de la Socia Asekursistemo, kaj la bankoj. En kelkaj landoj oni jam privatigis la akvoprovizon, kaj ankaŭ en Nikaragvo oni strebas al tio.

Per tiuj ĉi manovroj, tio, kion oni emas, estas strangoli la nikaragvan ŝtaton deprenante el ĝi tiujn rimedojn kiuj plenumas sociajn funkciojn. En la praktiko oni spertis pliiĝon je la kostoj de tiuj servoj, kio, siavice, pliigis la vivokoston, samkiel okazis en la ceteraj landoj, kie oni aplikis tian aranĝon.

Tiu ĉi leĝo kuraĝigos la pliiĝon de la sanokostoj, ĉar ĝi transformos la sanigcentrojn en entreprenojn administrataj de entreprenistoj, kaj ne plu de kuracistoj. La saman semajnon, la psikiatrino Gioconda Cajina (ĝjokonda kajina) estis esprimante sian alarmon antaŭ tiu ĉi leĝo dirante, ke en «Nikaragvo estas 3 milionoj da malriĉuloj, el ili malpli ol duono povas aĉeti medicinilojn, kio okazos al la ceteraj? Neeviteble, ili mortos». *Tiuj ĉi prisanaj proponoj estas aprioraĵoj kiuj jam malsukcesis en preskaŭ ĉiuj landoj de Iberameriko, kie estas klara la intenco forigi l' malriĉecon forigante la malriĉulojn.*

La pretendoj de l' MB kaj la FVI celas preter Nikaragvo. Tiuj ĉi samaj penoj estas realigataj en Elsalvadoro. Temas pri nova strategio fare de l' MB kaj la MVI por ekonomie strangoli la ŝtatojn kaj popolojn iberamerikajn. Tio ĉi , aldone al la sinteno de kostostagnigo de l' sanosistemo je usona stilo kiun pretendas ili altrudi, estigos, ke la sanokostoj pliiĝos eĉ pli. Oni devas aldoni al la dirito, ke *tiu ĉi usona modelo estas kaŭzante multajn problemojn en Usono mem, rilate al la kostoj de la sano kaj la mediciniloj, precipe por la maljunuloj. Nun oni volas ĝin altrudi en Iberameriko.*

Tiu ĉi situacio de duobla ekonomia strangolado —de la ŝtatoj kaj la popoloj— pli faciligos al la Unuiĝintaj Nacioj —al kiu apartenas MB— altrudi la naskolimigon.

Tiu ĝi altrudo venos de ambaŭ flankoj. Al la flanko ŝtata ĝi komencos ligante la flankan helpon al la antaŭakcepto de programoj kontroldemografiaj flanke de ŝtato eĉ pli ekonomie strangolita ol antaŭe. Al la flanko popola, ĝi manifestiĝos per la fakto ke nun al la loĝantaro, ĝenerale, kaj *al la geedzoj precipe, la sanosistemo premos pli facile ol atnaŭe por uzi evitgravedigilojn aŭ senfekundiĝi, pro tio, ke oni diros al ili, ke ili devas naskigi malpli da gefiloj tial ke ili profitos malpli kostan sanoatenton, kaj ili povu rezisti la vivokoston kaj pagi la fundamentajn servojn.* Jen elstara manovro por antaŭenigi siajn politikojn “pri seksa kaj reproduktiva sanoj” (t.e.: pri evitgravedigiloj kaj abortiloj).

Temas pri diabla strategio tre pripensita.

## *Stato de la abortopolitikoj —tie nomata "akcidenta kontraŭgravedigo"— en Honduraso*

Ni konsideras fundamente kaj urĝe, ke la civitanaro hondurasa estu konscia pri la signifo de "Akcidenta Kontraŭgravedigo" —esprimo uzata por kamufli la enkondukon de l' abortoj farmakologia aŭ ĥemia en la landojn kie ĝi estas kontraŭleĝa, tiaj, kiaj Honduraso, kie la leĝaro kvalifikas la aborton kiel delikton respekttante la vivorajton ekde la ekgravediĝo sen eksceptoj.

Certi la "Akcidentan Kontraŭgravedigon" kiel publiksanan rimedon, ĉefe celantan la junulojn, estas kuraĝigi la seksan troabundon, la patrecon malrespondecan kaj la perforton, sed ĝi ĉefe estas popolkontrolilo por eviti la ribelojn kontraŭ la maljusteco.

Estas grave elstarigi ke la menciita sistemo ne estas gravediĝa evitilo, sed abortmaniero. La agmaniero de la farmaciaĵoj utiligataj kiel "Akcidentajn kongraŭgravedigojn" estas mortige por la komencintaj vivoj. La efiko de la kvantego de hormonoj englutitaj post malmultaj horoj de la koito, kutime ne evitas la fekundiĝon, sed la enradikiĝon de la zigoto.

Laŭ la medicina revuo "The lancet" (de lanset), de Anglujo, oni avertu pri la reagoj kontraŭsanaj de la tiel nomita "akcidenta kontraŭgravedigo", ĉar la dozoj de hormonoj donitaj al la pacientoj estas ege altaj kaj povas fiefiki la cirkulsistemon.

Sendube, tiu ĉi procedo enriskas la virinojn, eĉ je frua morto, aŭ esti trafataj de infarktoj, trombozoj, embolioj, gravediĝoj eksteruteraj (ektopiaj), kaj tiel plu.

## *UN: Malfekundigi al la Malriĉuloj por Elradikigi la Mariĉecon, tio estas Murdi al la Viktimoj de la Maljusteco por Eviti ties ribelon.*

La pasintan trian de decembro, samtempe en Londono, Vaŝingtono, Novjorko kaj aliaj urboj, la Fonduso por la loĝantaro de Unuiĝintaj Nacioj, prezentis sian jaran raporton "La stato de la Monda Loĝantaro je 2002", sub la titolo "La loĝantaro, la malriĉeco kaj la eblecoj: laborante por la evoluo de la malriĉuloj".

La titolo de la ĵurnalrezumo pri la raporto kiun publikigas la Sekcio por la loĝantaro de UN, rezumas la enhavon: "Raporto pri la loĝantaro de UN bona reproduktiva sano por la virinoj estas esenca por finigi la malriĉecon".

La raporto de la Fonduso defendas, ke por solvi la problemojn de la loĝantaro estas nepre elfari la celojn de la Jarmilo de UN por la evoluo: forigi la mondajn malriĉecon kaj malsaton ĝis la duono de l' jaro 2015, malpliigi la mortokvanton patrininfanan, malpliigi la HIV/AIS-on, antaŭenigi la genran egalecon kaj la kuraĝigon de la ekonomia evoluo medie subtenebla.

La Fonduso de l' Unuiĝintaj Nacioj por la Nutriĝo kaj Progreso (FUNNP) argumentas en sia raporto, ke por atingi tiujn celojn en la malriĉiĝintaj landoj, necesas urĝa iniciato kiu kontraŭbatalos la malriĉecon pere de la reproduktiva sano (kaŝita aborto), elradikigante la nedeziritan fekundecon, la analfabetismon, kaj la kontraŭvirinan diskriminacion. Tamen ĝi ne diras, ke 85 procento el la homaro malsatas ĉar ekzistas imperiisma sistemo, regata de Usono, Eŭropo kaj Japanio, kiu rabas kaj murdas planedeskale. La raporto stimulas al la landoj "investi je sano" (abortoj kaj malfekundigoj), kio inkluzivas la sanon reproduktivan kaj la familian planadon, kaj ankaŭ investi je edukado, kaj je alpovigo de l' virinoj por atingi pli malrapidan loĝantaran kreskon krom pli rapidan ekonomian progreson. Oni intencas murdi la malriĉulojn en la memaj ventroj de ĝiaj patrinoj tiel ke la enriĉiĝintaj landoj vivu trankvile.

Kontraŭ ĉiuj seriozaj kaj neŭtralaj esplorraportoj, la menciita insistas pri la ideologio de la morto, dirante: "La malpliigo de la naskokvanto kreskigas la procenton de homoj en siaj laboraĝoj, donante al la evoluantaj landoj ŝancon pliigi sian produktivecon, kaj certigante ilin bazon por estonta progreso".

Laŭ la Fonduso, "la maladekvataj penoj por provizi servojn de reproduktiva sano kaj kontraŭbatali la genran malegalecon, rezultigas altan fekundecon inter la malriĉuloj, ĉiamigante tiel la malriĉecon kaj malegalecon inter la familioj kaj inter la nacioj". Cinike la raporto asertas, ke la kialo de la malriĉeco estas la malriĉuloj mem. Jen mensogo minacanta veneni la mondan, publikan opinion.

Nature, la granda senkulpiĝo de FUNNP esas "kontraŭbatali la malegalaĵojn —pliigante en la malriĉiĝintaj landoj la mankon de atingebleco de la virinoj al siaj rajtoj kaj al la reproduktiva sano, por forigi la nedeziritan fekundecon". Estas interese vidi kiel la feminismo estas la parapeto utiligata por kaŝi la verajn kialojn de la malsato, murdante pro ĝi ene de la patrina ventro. Kion pensas la progresema feminismo esti evidente aliancita al la nov-kapitalisma strategio por murdi kaj ekspluati al la plejmulto el la homaro komencante per tiuj, kiuj eĉ ne povas defendiĝi?

*G. Salvatierra*

Venas de paĝo 21-a

*atendantaj la signalon pri la leviĝo de la rivero, kiu efektive malfruis. Jam de du tagoj la vento blovis de l' maro kaj la rivero verdiĝis; jam la suno preterpasis la stelon Sotis, sed en la pastra puto en Memfiso la akvo ne leviĝis eĉ unu fingron. La popolo estis maltrankvila, tiom pli ke en Supra Egipto laŭ la signaloj la leviĝo estis regula, eĉ espereble bonega.*

*- Kio do malfruigas ĝin apud Memfiso? - demandis la ĉagrenitaj terkulturistoj, sopire atendante la signalon.*

*Kiam sur la ĉielo aperis la steloj, Tafet en la manĝoĉambro kovris la tablon per blanka tuko, starigis la kandelingon kun sep eklumigitaj kandeloj, alŝovis tri seĝojn kaj anoncis, ke tuj ŝi alportos la sabatan vespermanĝon.*

*Tiam Gedeono kovris sian kapon kaj, etendinte la manojn super la tablo, parolis direktante la okulojn al la ĉielo:*

*- Dio de Abrahamo, Izaako kaj Jakobo, vi kiu elkondukis nian popolon de la tero de Egipto, kiu donis patrujon al la sklavoj kaj ekzilitoj, kiu faris eternan ligon kun la filoj de Judo... Dio Jehovo, Dio Adonai, permesu al ni manĝi sen peko la fruktojn de la malamika tero, eltiru nin el la malĝojo kaj timo, en kiu ni dronas, kaj reportu nin al la bordoj de Jordano, kiun ni forlasis por via gloro...*

*En la sama momento trans la muro eksonis voĉo:*

*- Lia ekscelenco Tutmozis, la plej fidela servisto de lia sankteco kaj de l' kronprinco...*

*- Li vivu eterne!... - diris kelke da voĉoj en la ĝardeno.*

*- Lia ekscelenco - daŭrigis la unua voĉo - sendas saluton al la plej bela rozo de Libano!*

*Kiam li eksilentis, eksonis harpo kaj fluto.*

*- Jen muziko! - kriis Tafet, klakbatante la manojn. - Ni festos la sabaton kun akompano de l' muziko.*

*Sara kaj ŝia patro, en la komenco teruritaj, ridis kaj sidiĝis ĉe la tablo.*

*- Ili ludu - diris Gedeono - ilia muziko ne malbonigos al ni la apetiton.*

*La fluto kaj harpo finludis strofon, poste tenora voĉo ekkantis:*

*- » Vi estas pli bela ol ĉiuj knabinoj, kiuj sin rigardas en la akvoj de Nilo. Viaj haroj estas pli nigraj ol la plumoj de l' korvo, viaj okuloj rigardas pli kviete ol la okuloj de la cervino, kiu sopiras al sia cervo. Vi estas kvazaŭ alta palmo, kaj la lotuso envias vian gracion. Viaj brustoj estas kiel vinberaroj, kies suko ebriigas la reĝojn. «*

*Ree eksonis la fluto kaj harpo kaj post ili la kanto:*

*- » Venu kaj ripozu en la ĝardeno. La servistoj, kiuj apartenas al vi, alportos vazojn kaj diversspecan bieron. Venu, ni sanktigos la hodiaŭan nokton kaj la aŭroron, kiu ĝin sekvos. En mia ombro, en la ombro de l' figarbo, kiu naskas dolĉajn fruktojn, via amato ripozos ĉe via flanko; vi ebriigos lin kaj obeos al liaj deziroj... «*

*La fluto kaj harpo, poste ree la kanto:*


*- » Mi estas silentema, neniam mi diras, kion mi vidas, kaj mi ne malbonigas la dolĉecon de miaj fruktoj per vana babilado... « [Aŭtentika]*

# La Faraono, ĉapitro 9-a

Sur la maldekstra bordo de Nilo, apud la norda antaŭurbo de Memfiso estis la bieno, kiun la kronprinco donis por loĝejo al Sara, filino de Hebreo Gedeono.

Tio estis peco da tero dudek-hektara, formanta malgrandan kvadraton, kiun de la supro de l' domo oni povis ĉirkaŭpreni per la rigardo, kvazaŭ sur manplato. La kampoj de la bieno estis sur altaĵo kaj kuŝis sur kvar etaĝoj. Du plej malaltaj kaj plej vastaj, kiujn Nilo ĉiam subakvigis, estis destinitaj por kulturado de grenoj kaj legomoj. Sur la tria etaĝo, kiun iafoje ne atingis Nilo, kreskis palmoj, figujoj kaj aliaj fruktarboj. Sur la kvara, plej alta, estis ĝardeno de olivaj arboj, vinberujoj, nuksarboj kaj kaŝtanujoj, inter kiuj staris la domo.

Ĝi estis ligna, unuetaĝa, kiel kutime kun teraso, super kiu pendis tola tendo. Malsupre loĝis la nigra sklavo de Ramzes, supre Sara kun sia parencino kaj servantino Tafet. La domo estis ĉirkaŭita de muro el palaj brikoj, ekster kiu ne malproksime estis la konstruaĵoj por la brutoj, terkulturistoj kaj gardistoj.



Sankta skarabo

La ĉambroj de Sara ne estis grandaj, sed tre elegantaj. Sur la planko kuŝis tapiŝoj, ĉe la pordoj kaj fenestroj pendis kurtenoj kun multkoloraj strioj. Estis tie skulptitaj litoj kaj seĝoj, inkrustitaj kestoj por vestoj, tripiedaj kaj unupiedaj tabloj, sur kiuj staris vazoj kun floroj, altaj kruĉoj por vino, skatoletoj kun boteletoj de parfumoj, oraj kaj arĝentaj pokaloj kaj glasetoj, fajencaj supujoj kaj pladoj, bronzaj lanternoj. Ĉiu plej malgranda objekto kaj vazo estis ornamita per skulptaĵo aŭ kolora desegnaĵo, ĉiu vesto - per brodaĵoj kaj franĝoj.

Jam dek tagojn Sara loĝis en ĉi tiu rifuĝejo, de honto kaj timo kaŝante sin tiel de ĉiuj, ke preskaŭ neniu el la servistoj vidis ŝin. En sia buduaro ŝi kudris, teksis tolon sur malgranda stablo, aŭ plektis por Ramzes kronojn el freŝaj floroj. Iafoje ŝi englitis sur la terason kaj singarde disiginte la tolojn de la tendo, elrigardis al Nilo, plena de ŝipetoj, kies remistoj gaje kantis. Aŭ levinte la okulojn rigardis kun timo la grizajn pilonojn de la faraona kastelo, kiu malgaje kaj silente reĝis sur la alia bordo de l' rivero. Tiam ŝi ree forkuris al siaj laboroj kaj alvokis Tafeton.

- Sidu ĉi tie, patrino - diris ŝi. - Kion vi faras tie malsupre?...

- La ĝardenisto alportis fruktojn, kaj el la urbo oni alsendis panon, vinon kaj birdojn; mi devis preni tion.

- Sidu tie ĉi kaj parolu, ĉar timo ĉirkaŭas min.

- Vi estas malsaĝa infano! - respondis Tafet ridante. - Ankaŭ min en la unua tago rigardis timo el ĉiu angulo; sed kiam mi eliris ekster la muron, ĉio ĉesis. Kiun mi devas timi ĉi tie, kie ĉiuj falas antaŭ mi sur la genuojn? Antaŭ vi ili sendube stariĝus sur la kapo! Iru en la ĝardenon, ĝi estas bela kiel paradizo. Iru sur la kampon, kie oni rikoltas la tritikon... Sidiĝu en la skulptitan ŝipeton, kies remistoj sekiĝas de sopiro vidi vin kaj veturigi sur Nilo.

- Mi timas...

- Kion?

- Ĉu mi scias?... Dum mi kudras, mi pensas, ke mi estas en nia valo kaj ke tuj venos la patro. Sed kiam la vento forpuŝas de l' fenestro la kurtenon, kaj kiam mi rigardas de supre ĉi tiun grandan... grandan landon, ŝajnas al mi... ĉu vi scias kio?... ke vulturo kaptis min kaj forportis en sian neston sur ŝtonego, de kiu oni ne povas malsupreniri.

- Ah, vi... vi!... Se vi scius, kian banujon sendis la princo hodiaŭ, kupran banujon!... Kaj kian tripiedon por la fajrujo, kiajn potojn kaj turnrostilojn!... Kaj se vi scius, ke mi hodiaŭ sidigis kovi du kokinojn, kaj ke baldaŭ ni havos kokidetojn...

Post la subiro de l' suno, kiam neniu povis ŝin vidi, Sara estis pli kuraĝa. Tiam ŝi, eliradis sur la terason kaj rigardis la riveron. Kaj kiam malproksime aperis la ŝipeto, lumigata per torĉoj, kiuj skulptis sur la nigra akvo sangajn kaj fajrajn striojn, Sara per ambaŭ manoj premis sian malfeliĉan koron, kiu tremis, kiel kaptita birdo. Tie, veturis al ŝi Ramzes, kaj ŝi ne povus diri, kio okazas en ŝi: ĉu ĝojo, ke proksimiĝas la bela junulo, kiun ŝi ekkonis en la valo, aŭ timo, ke ŝi ree vidos la estron kaj sinjoron, kiu timigas ŝin?

Foje, en antaŭtago de sabato ŝia patro venis en la bienon, la unuan fojon de l' tago, en kiu ŝi ekloĝis tie. Sara kun larmoj sin ĵetis al li; ŝi mem lavis al li la piedojn kaj parfumis liajn harojn, kovrante lin per kisoj. Gedeono estis homo jam griziĝanta, kun severaj trajtoj. Li portis ĉemizon longan ĝis maleoloj, kies rando estis kolore brodita, kaj sur ĝi flavan jakon sen manikoj, specon de kovrilo sur la dorso kaj brusto. La kapon kovris malgranda ĉapo mallarĝiĝanta supren.

- Vi estas?... vi estas!... - kriis Sara kaj rekomencis kisi liajn manojn kaj kapon,

- Mi mem miras, ke mi estas ĉi tie! - respondis malĝoje Gedeono. - Mi iris al la ĝardeno kiel ŝtelisto; sur la tuta

vojo de Memfiso ŝajnis al mi, ke ĉiuj Egiptanoj min montras per la fingroj kaj ke ĉiu Hebreo kraĉas...

- Vi ja, patro, mem donis min al la princo?... - murmuretis Sara.

- Mi donis, ĉar kion mi povis fari? Cetere nur ŝajnas al mi, ke oni min montras kaj kraĉas sur min. El la Egiptanoj, kiu min konas, salutas min des pli profunde, ju pli alta li estas. Dum la tempo, kiam vi estas ĉi tie, nia sinjoro Ĥaires donacis al mi barelon da plej bona vino, kaj lia ekscelenco la nomarĥo mem sendis al mi sian konfidaton kun demando: ĉu vi estas sana kaj ĉu mi ne konsentus esti lia intendanto?

- Kaj Hebreoj?... - demandis Sara.

- Kio, Hebreoj!... Ili ja scias, ke mi ne cedis propravole. Kaj ĉiu dezirus, ke oni tie superfortu lin. Juĝu nin ĉiujn Dio. Prefere diru, kiel vi fartas?

- Sur la sino de Abrahamo ŝi ne fartos pl bone - interrompis Tafet.

- La tutan tagon oni alportas al ni fruktojn, vinon, panon kaj viandon, ĉion kion on povas deziri. Kaj kian banujon ni havas tutan el kupro. Kaj kian ilaron en ia kuirejo!...

- Antaŭ tri tagoj - interrompis Sara - estis ĉe mi la Feniciano Dagon. Mi ne volis lin vidi, sed li tiel insistis...

- Li donis al mi oran ringon - intermetis Tafet.

- Li diris al mi - daŭrigis Sara, - ke li estas terluanto de mia sinjoro; li donacis al mi du braceletojn por la kruroj, perlajn orelringojn kaj skatoleton kun parfumoj de Punt.

- Por kio li ĉion ĉi donacis al vi? - demandis la patro.

- Por nenio. Li nur petis, ke mi pensu favore pri li kaj iafoje diru al mia sinjoro, ke Dagon estas la plej fidela lia servisto.

- Vi tre rapide kolektos tutan keston da braceletoj kaj orelringoj - respondis Gedeono kun rideto. - Ah! - aldonis li post momento - kolektu plej baldaŭ grandan riĉaĵon kaj ni forkuru en nian landon, ĉar ĉi tie ĉiam atendas nin malfeliĉo! Malfeliĉo, kiam estas malbone, kaj ankoraŭ pli granda malfeliĉo, kiam ni prosperas.

- Kaj kion dirus mia sinjoro? - demandis Sara malĝoje. La patro skuis la kapon.

- Antaŭ kiam pasos unu jaro, via sinjoro forlasos vin, kaj la aliaj lin helpos. Se vi estus Egiptanino, li prenus vin en sian domon, sed Hebreinon...

- Li forlasos min?... - ripetis Sara kun ĝemo.

- Por kio sin ĉagreni per la estontaj tagoj, kiuj estas en la manoj de Dio! Mi venis por pasigi ĉe vi la sabaton.

- Kaj mi havas bonegajn fiŝojn, viandon, kukojn kaj kuŝeran vinon, - vive intermetis Tafet. - Mi ankaŭ aĉetis en Memfiso sepobrakan kandelingon kaj vaksajn kandelojn... La vespermanĝo estos pli bona ol ĉe la sinjoro Ĥaires mem.

Gedeono eliris kun la filino sur la terason; kiam ili restis solaj, li diris:

- Tafet rakontis al mi, ke vi ĉiam restas hejme. Kial? Oni devas eliradi almenaŭ en la ĝardenon.

Sara ektremis.



- Mi timas - murmuretis ŝi.

- Kial vi timus vian propran ĝardenon?... Vi ja estas ĉi tie sinjorino, granda sinjorino...

- Foje mi eliris tage en la ĝardenon... Ekvidis min iaj homoj kaj komencis paroli unu al la alia: » Rigardu, jen estas la Hebreino de la kronprinco, ŝi estas la kaŭzo de la malfruo de la leviĝo de Nilo!... «

- Ili estas malsaĝaj - interrompis Gedeono. - Ĉu ne pli ol unu fojon Nilo malfruis tutan semajnon? Dume vi promenadu vespere.

Sara tremis pli kaj pli forte.

- Mi ne volas... mi ne volas... - ekkriis ŝi. - Alian fojon mi iris vespere tien inter la olivarbojn. Subite de flanka vojeto elglitis, kvazaŭ ombroj, du virinoj... Timigite mi volis forkuri... Tiam unu el ili, pli juna kaj pli malalta, kaptis min je la mano, dirante: » Ne forkuru, ni volas vin vidi de proksime. « Kaj la alia, pli maljuna kaj pli alta stariĝis kelke da paŝoj antaŭ mi kaj ekrigardis miajn okulojn... Ah, patro, mi pensis, ke mi fariĝos ŝtono... Kia virino... kia rigardo!...

- Kiu tio povis esti? - demandis Gedeono.

- La pli aĝa havis aspekton de pastrino.

- Kaj ŝi nenion diris al vi?

- Nenion. Nur kiam forirante ili malaperis post la arboj, mi aŭdis la voĉon de la pli aĝa kredeble, kiu diris la vortojn: » Vere, ŝi estas bela... «

Gedeono ekmeditis.

- Eble tio estis - diris li - grandaj sinjorinoj de la kortego?

La suno estis subiranta, kaj sur ambaŭ bordoj de Nilo kolektiĝis densaj amasoj da homoj, malpacience

Finas en paĝo 19-a

Enkonduko en muzikon

# La Ruĝa Pastro



Ĉar liaj haroj estis ruĝaj, aŭ ĉar oni diris, ke li estis tre *fajra* pri virinoj, kaj aldone li estis pastro, oni nomis Antonjon Vivaldi-n *Il Prete Rosso*, la ruĝa pastro. Antonjo Vivaldi naskiĝis la 4-an de marto de 1678 en Venecio. Lia patro, Johano Baŭtisto, estis tondisto, kiu lernis ludi violonon, kaj iĝis profesia ludisto poste. Li lernigis junan Antonjon la arton ludi kaj komponi por violono, kaj li formis artisman paron, kiu ludis por mono je la mirinda Placo de Sankta Marko, de la fama urbo sur la maro. La filo multe amis muzikon, kaj la patro havis aliajn sep gefilojn, do kompleti sian edukadon, estis tiutempe nur unu sola efika vojo: la eklezio. Sekve, la infano iĝis pastro.

Sed la nomo Vivaldi estas tre ligita al *Ospedale della Pietá*, Orfejo de la Kompato. Tie junaj virinoj ricevis edukon por poste iĝi bonaj dommastrinoj kaj edzinoj. Ili ne nur estis orfinoj, sed ankaŭ naturaj filinoj de aristokratoj lokaj, kaj ankaŭ malbone kondutaj infaninoj, kiujn oni dresis tie, eble pravigante tiun diraĵon, ke *muziko pacigas bestojn*. Kiel ajn, la *Ospedale* estis ejo kie loĝis amaso da junulinoj, kies plej olda jariĝis 20e (post tiu aĝo ili foredziniĝis), kiu tre profesie lernis pri muziko: kanto, ludarto, koncertarto estis ĉiutaga en ilia vivo. Al tiu ĝardeno de beleco kaj muziko venis juna pastro Antonjo Vivaldi, kiam li estis 25 jaraĝa, unue kiel instruisto pri violono, kaj poste kiel direktoro de la orĥestro virina. Tiuj virinoj kutime ne vidis aliajn virojn ol siajn instruistojn, kiuj plej ofte estis pastroj, kiel Vivaldi. Tamen, pro lia juneco komencis onidiraĵoj pri lia *gusto*[1] pri virinoj. Tamen, dum lia tuta vivo nenion seriozan oni povus pruvi tiusence rilate al la orfejo. Nur kiam li foriris el la orfejo premieri siajn operojn, oni akuzis lin pri amoro al sopranino Anna Giro, kun kiu li vivis dum siaj vojaĝoj eksterlande kaj poste en Venecio, kune kun ŝia fratino, Paolina. Fakte ŝi estis 16jaraĝa kaj li 48-a, kiam ili ekkonis unu la alian. Ni scias pri tiu afero, ĉar li perskribe defendis sin kontraŭ fifamigo fare de enviuloj. Alia plendo kontraŭ Vivaldi estis, ke li ne diris meson. Fakte li plenumis sian devon kiel pastron nur malofte, pro malsano, laŭ lia diro. Laŭ la priskribo de tiu malsano, oni povas pensi, ke li emis havi anginon, sed tio ankaŭ povus esti ekskuzo. Restas kelkaj akuzoj kontraŭ li pro tio, ke li interrompis la mesodiradon por rapide surpaperigi ideojn muzikajn, kiuj ekvenis al li dum ke li diris meson...


Tamen, pastroj estis kaj estas multaj en la mondo, sed la muziko de nia *ruĝa pastro* estas ĉarma kaj unika. Nun oni povas pensi, ke ĝi estas laŭnorma kaj nia orelo certe ne suferas aŭdi ĝin. Sed tiutempe, en la 17-a jarcento, li disvolvigis muzikon. Li uzis la muzikon de Arkanĝelo Koreli (Corelli, itale) kiel modelo dekomence, kaj evoluigis sian eltrovaĵon, la grandan koncerton (concerto grosso), kie estis aro da kelkaj instrumentistoj –ĉefe violonistoj—, kiu kantis kontraŭ la amaso de la cetera orĥestro. Antonjo Vivaldi disvolvigis tiun ideon, kaj igis tiun ĉelon da muzikistoj solistaj vera unika instrumento. Plue, li verkis koncertojn por solistoj, plej ofte ludite de li mem, ĉar li estis tre bona violonisto, laŭ

[1] ŝato kulturita.

tiutagaj raportoj, kaj li aŭtoris la unuan koncerton por flaŭto flanka (travesera), kiun oni skribis surpapere en la tuta historio de muziko. Li ankaŭ estis la unua sudeŭropa komponisto, kiu verkis por klarneto kaj hobojo, kaj antaŭanoncis la uzon de organo kiel artan muzikaĵon nepreĝejan, ideo prenota de Johano Sebastjano Baĥ, precize el Vivaldi, kiun la majstro germana multe admiris, kaj kiun plendis, ke li ne povis renkonti. Vivaldi ankaŭ progresisigis muzikon je la senco, ke li estis la unua, kiu faris *simfonian poemon*, tio estas, reprezenti rakonton per muziko: ni aŭdu birdetojn en lia verko *Printempo*, koncerto de sia 8-a verkaro (aŭ opus).

La muziko de Vivaldi, eĉ se ĉarma kaj freŝa, estis kondiĉigita de la modo tiutempa: oni aŭskultis muzikon unu solan fojon, kaj poste novan muzikon oni devis komponi. Ne estis kopirajto tie, sed vere oni ne bezonis ĝin, ĉar muziko utilis nur unufoje. Tial, multaj komponistoj –ankaŭ Haendel kaj Baĥ poste—reuzis temojn en siaj novaj komponaĵoj, kiujn ili jam uzis en antaŭaj verkoj. Tion oni ne rimarkus, kompreneble, ĉar ne estante fonografon tiam, kaj uzante la temojn per diversa formo kaj variaĵoj, fakte la afero per si mem ne estas rimarkebla kaj ne objĵetinda. Vivaldi estis fama dum la plej granda parto de sia vivo, sed je la fino, li mortis dum li vizitis Vienon, kaj li estis enterigita kiel malriĉulo, en tombejo komuna, same kiel Mozart. Kurioze, unu el la infanoj, kiuj kantis dum la funebroservo, nomiĝis Jozefo Haydn, kiu poste estos grava muzikisto, kiu kreos la modernan orĥestron kaj la koncepton klasikan muzikon.

Dum ducent jaroj la muziko de Antonjo Vivaldi dormis en arĥivejoj, ĉefe en Germanio kaj en Italio. La muziko de Vivaldi, kiu aperis en Germanio estis kolektita origine de Johano Sebastjano Baĥ, kiu fakte transskribis kvin verkojn de la Opus 3 (La *estro armonico*, tio estas, muzika inspiro), kaj estis remalkovrata je la komenco de la 20-a jarcento. Poste, en 1926 monaĥejo de Piedmonto, Italio, deziris disvendi muzikajn paperaĵojn, kiujn ili havis de longe. Fakisto Alberto Ĝentili rapide komprenis, ke temis pri 14 volumoj de la plej bona muziko iam farita en Italio, kiu inkluzivis pli ol cent koncertojn, dek du operojn, 29 kantatojn, kaj unu oratorion, ĉio komponita de Antonjo Vivaldi. Baldaŭ aperis orĥestroj, kiuj studis kaj ludis nur verkojn de Vivaldi, kiel *I Musici* (la muzikistoj) de Roma. Alberto Pincherel katalogis la tutan verkaron de Vivaldi, kaj pro tio liaj verkoj estas klasigitaj kun P kaj nombro. Ĝi enhavas pli ol 500 koncertoj, 40 kantatoj, 22 operoj kaj pli ol 60 liturgiaj verkoj. Eble la plej konataj estas la Kvar Koncertoj grosoj diritaj *La kvar sezonoj*, ĉar unu estas nomita *Printempo*, alia *Somero*, alia *Aŭtuno* kaj *Vintro*. Sed ankaŭ estas ĉarma koncerto por mandolino, heredita de gitaro tiel, ke oni konas ĝin hodiaŭ, kiel *la koncerto por gitaro de Vivaldi*. ☺ La ĉefaj koncertoj de Vivaldi estas arigitaj en verkaroj 1-a ĝis 12-a, el kiuj elstaras la 1-a, kie estas liaj famaj *Variaĵoj pri la Folia* (fama temo itala, kiun oni atribuas hispanan originon, kaj kiujn aliaj komponistoj, kiel eĉ Fernando Sor kaj François de Fossa ankaŭ variis poste); Verko 3-a, alidirite *Estro Armonico* aŭ muzika inspiro, kiu famigis Vivaldion, ĉefe en Germanio; Verkaro 4-a, alidirite *La Stravaganza*, ĉar multe ĝi petas el violono solista; Verkaro 8-a, alidirite *La kvar sezonoj*, kiun li saĝe dediĉis al Grafo Wenzel von Morzin de Bohemio, gajnante lian protekton; La verkaro 10-a, alidirite *Il gardellino*, kiu estis la unua koncerto por flaŭto, kaj kiu estas la sola muziko vivaldia ne por violono. Kvankam aperis verkaro 13-a, *Il pastor Fido*, finfine oni pruvis, ke ne estas verko de Vivaldi, sed de franco (Nicholas Chedeville), kiu volis fari monon per la nomo de Vivaldi. Dume, oni trovis alian verkaron, kaj publikigis ĝin kiel Verkaron 14-an, kaj tiufoje ĝi ŝajnas esti vera verko de Vivaldi: temas pri ses sonatoj por violonĉelo.



# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

| | | |
|---|---|---|
| REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** | Tfn° (00 34) 658 166 323 | **Retskribu al jesuo@ono.com** |

**http://www.iespana.es/kajeroj.htm**

**http://storm.prohosting.com/jesuo** **Esperanto@iespana.es**

## La Statuto de SAT

### SERVOJ

24. La servoj de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj aktivaj kaj subtenantaj.

25. Principe la membroj aktivaj devas doni senpage informon kaj helpon pri vojaĝo, enketo, ktp., al ĉiu membro, kiu sin turnas al ili. Ili havas la devon respondi ĉiun laŭregulan informpeton de alia membro, en templimo de 15 tagoj eĉ se ili havas nenian kompetenton por plenumi la deziron de la petanto. Tamen ili rajtas ne respondi al petanto se: A) la letero ne estas redaktita esperantlingve, B) la peto havas karakteron konfidencan aŭ ofendan, C) La afero postulas elspezojn, ekzemple, se responda afranko ne estas aldonita, Ĉ) La membronumero ne estas indikita.

26. Resume: ĉies devo estas tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, kaj ke ĉiu trovu en alia membro la plej bonan kaj la plej certan peranton por vojaĝo, informo, enketo, serĉoj, ktp.

27. La membroj firme konvinkiĝu kaj neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn: la Asocio ja havas praktikan kaj idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo kaj prosperigo de senklaseca kaj senekspluateca socio.

Paĝoj 8-a kaj 9-a de la ***Statuto de SAT.***

**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Ankaĉus'.**